

KUNORDIGITAJ ESPERANTO-KURSOJ INTERNACIAJ EN POPOL-
UNIVERSITATOJ KAJ SIMILAJ INSTITUTOJ.
LOKA GRUPSTUDO.

La bela iniciato de s-ino D-rino Tine Peter-Ruetschi (Zürich, Svisujo) kaj de la Züricha Popol-altlerneja direkto por internacia kunordigo de Esperanto-kursoj en populuniversitatoj kaj similaj institutoj donas al ni, esperantistoj, bonvenan okazon kontribui al la disvastigo de la internacia lingvo pere de valoraj klerig-institutoj kiuj funkcias jam dum multaj jaroj.

Ci sube sekvas superrigardo pri la kurso en Den Haag, Nederlando. La raporto povas eble iomete servi kiel modelo de sciigo pri grupstudo en la koncerna kampo.

Organizanta institucio: Popol-universitato de Hago. Direktoro S-ro H. Ch. G. J. van der Mandere.

Docento: S-ro Mag. Sigismundo Prágano.

Metodo: Laŭ la konata Cseh-metodo, kombinita kun la taskoj de la kunordigita kursaro. Rilate la enkondukon en la internacian korespondadon vidu aldonajon B.

Lecionoj:

nombro 20. Daŭro: 2 horoj po semajno kun 10-minuta paŭzo;

entute: 40 horoj;

momento: ĉiusemajne, unu vesperon;

komenco: la 17an de oktobro 1952.

Datoj de la lecionoj:

Monato	Datoj de lecionoj					Sumo
1952 oktobro	—	(17)	24	31	—	2
novembro	7	14	21	28	—	4
decembro	(—)	12	19	(—)	—	2
1953 januaro	(—)	9	16	23	30	4
februaro	6	13	20	27	—	4
marto	6	13	20	27	—	4

() : 17-X enkonduko (ekstervica);

Rim.: 5-XII S. Nikolaotago; 26-XII 2a Kristfestago; 2-I ferio. 20

Kotizo: Egala al kotizo pagata por la instruo en aliaj fremdaj lingvoj ĉe la Popol-universitato.

Kunvenejo: Salono en la Centro de Kulturaj Kunvenoj.

Nombro de la partoprenantoj: Je la komenco de la kurso 35; aliĝis je la tria leciono ankoraŭ 3; entute 38.

Konsisto de la grupo: Vidu aldonajon A: 1. Resumo; 2. Profesioj, okupoj; 3. Specialaj interesiĝoj.

Koresponda parto: Vidu aldonajon B.

Aldonaĵo A.

A. 1. Resumo.

Nombro de la kursanoj	el ili estas		Aĝoj varias de	
	virinoj	viroj	virinoj	viroj
38	25	13	21 ĝis 60 jara	19 ĝis 71 jara
	f-inoj 14			
	s-inoj 11			

A. 2. Profesioj / okupoj.

Profesio-grupo, okupo	Nombro	Virinoj	Viroj	Aĝoj en jargrupoj							
				ĝis 14 j	15/19 j	20/29 j	30/39 j	40/49 j	50/59 j	60/69 j	70/74 j
...	2	1	1	—	—	—	1	—	1	—	—
... kaj Komerco	2	1	1	—	—	—	—	2	—	—	—
... roj	9	7	2	—	—	1	1	3	4	—	—
...o, Instruo, k. c.	5	—	5	—	—	1	—	1	2	1	—
... Nocia prizorgo.											
... prizorgo, k.t.p.	8	7	1	—	—	4	4	—	—	—	—
...o	8	8	—	—	—	—	—	3	4	1	—
...o	1	—	1	—	1	—	—	—	—	—	—
...ita	1	—	1	—	—	—	—	—	—	—	1
...nciata	2	1	1	—	—	—	—	—	—	—	—
Sumo	38	25	13	—	1	6	6	9	11	2	1

A. 3. Specialaj interesiĝoj.

Speciala interesiĝo	Nombro	Virinoj	Viroj	Aĝoj en jargrupoj							
				ĝis 14 j	15/19 j	20/29 j	30/39 j	40/49 j	50/59 j	60/69 j	70/74 j k. pli
...o. Psikologio.											
...o. Pedagogio ..	12	6	6	—	—	5	—	2	4	1	—
...o. Ekonomio.											
...oj kaj Socialaj											
...oj	12	8	4	—	—	2	2	3	4	1	—
...nacia kun-											
...orado	10	5	5	—	1	—	1	2	6	—	—
...oj	16	13	3	—	2	1	—	7	5	1	—
...oj	7	4	3	—	1	—	—	3	1	2	—
...oj. Turismo ...	7	4	3	—	1	—	—	3	1	2	—
...oj	2	1	1	—	—	1	—	1	—	—	—
...oj	3	1	2	—	—	3	—	—	—	—	—

...ko: Diversaj kursanoj menciis pli ol unu specialan interesiĝon; ĉiuj mencioj estas metitaj tabelon.

Aldonajo B.

Pri la koresponda parto de la kurso.

Signifo, intenco de la internacia Esperanto-korespondado inter samkursanoj.
Ĝi estas eksperimento kaj celas:

- a. allogi al la lernado de Esperanto en kursoj;
- b. interesiĝi la partoprenantojn pri la praktika uzado de Esperanto;
- c. atesti pri la taŭgeco de Esperanto kiel lingvo internacia kaj pri ĝia facila uzebleco;
- d. klopodi krei specialan instruformon por internacia kunlernigado de Esperanto.

Tiu internacia korespondado estis aldone prezentata kaj evoluigata laŭ bezono, deziro kaj cirkonstancoj.

Tiuj konsideroj estis la elirpunktoj en la realigado de la koresponda parto de la Haga kurso.

La problemaro. La korespondado, ne-ĝustmaniere enkondukite, povas malhelpi la harmonian iron de la instruo. Pro tio la korespondado estis efektiva pruntentgvide.

La multeco kaj la diverseco de la personoj (diferenco de aĝoj, profesioj, interesiĝoj, intencoj) povas malplifaciligi la korespondan renkonton. Pro tiuj prave atenditaj diverseco kaj multeco de adresoj estis dezirinde ke la adresoj se eble estu trafe kombinitaj anstataŭ lasi la aferon al la kursanoj mem.

Cirkuligi la listojn pri eksterlandaj korespondemaj kursanoj inter niaj partoprenantoj por ke ili trastrektu la prenitajn adresojn kostus tro da tempo aŭ kaŭzus ne seriozan elekton. Pendigo de la listoj en salono aŭ koridoro havas samajn malhelpaĵojn kaj ankoraŭ aliajn.

Partopreno en la internacia korespondo estis proponata al la kursanoj en la tria vespero kaj la kursanoj povis pere de biletoj menci nomon, adreson, aĝon, civilan staton, profesion/okupon kaj specialajn interesiĝojn. Tiuj informoj necesas, kiel estis la klarigo en la kurso, por simplamane konigi sin iomete al eksterlandanoj. Ĉar la korespondado devas resti elementa, oni ne povas atendi ke la kursanoj skribu pri specialaj temoj jam en ĝia komenca periodo.

El la 38 kursanoj 4 ne havis tempon aŭ ŝaton kunlabori kaj preferis sekvi nur la lecionojn, do restis 34.

El la 4 flegistinoj inter la korespondpretaj kursanoj 3 poste forestis tiom da fojoj el la kurso pro deĵoro en malsanulejo, ke ili ne povis kontribui al la internacia korespondo. Do restis fine 31 korespondpretaj partoprenantoj de la Haga kurso.

Anoncoj pri korespondemaj kursanoj envenis sinsekve de la eksterlandaj centroj en periodo de kvin semajnoj post la komenciĝo. Tiam la ricevitaj donitaĵoj, tiutempe 134 adresoj, estis kombinitaj kun la donitaĵoj de la Hagaj kursanoj.

Elirpunkto en tiu kombinado estis la komparo de profesio-spec. interesiĝo aŭ spec. interesiĝo-profesio; aliaj valoraj faktoroj en tiu kombino estis aĝo kaj eventuala speciala deziresprimo, do ne speciala atento estis donata al interkonatigo de sinjoroj kun sinjor(in)oj aŭ fraŭlinoj. Pro parta manko de informoj en la ricevitaj listoj (ekz. koncerne aĝon, profesion aŭ specialan interesiĝon) en kelkaj kazoj la elekto ne povis efektiviĝi.

Ĉiu Haga kursano ricevis en la kurskunveno 1 ĝis 4 adresojn por elekti el ili aŭ akcepti ilin ĉiujn por la korespondado.

En la daŭro de la sekvintaj semajnoj la kursanoj transdonis al la korespondperanto la skribitajn leterojn. Pri la fakto ke ili intencas interkontakti kun kursano en eksterlando, noto estis farata, post kio la peranto ekspedis la leterojn al la adresitaj personoj. Per tiu simpla metodo la tuto de la unuaj kontaktoj estis observata kaj enskribata.

Pri poste ricevitaj adresoj la kursanoj estis informataj individue.

Superrigardo pri la proponitaj kombinaĵoj (hagano-eksterlandano) troviĝas en aldonajo B 2 kaj fakta rezulto pri la realigita korespondo en aldonajo B 3.

Post la unua leterkontakto la korespondado evoluis laŭ propra naturo kaj ebloj. En la kurso mem la kursanoj ricevis la eblon rakonti pri siaj spertoj kaj montri ricevitajn korespondajojn.

Ni kiel eble plej instigis la kursanojn al la internacia enkonduka korespondo. La konstato estas ke la diversaj prezentitaj perspektivoj en la internaciaj kontaktoj certe sufiĉis al ili.

La tuto evoluis ĝustamane kaj konforme al la elirpunktoj menciitaj.

La ricevitaj korespondajoj respondis el instrua vidpunkto en tre kontentiga maniero al la atendoj.

B. 1. Superrigardo de la ricevitaj listoj pri korespondemaj kursanoj.

Loko	Lando	F-inoj	S-inoj	S-roj	Sumo
Helsinki	Finnlando	7	2	4	13
Karlstad	Svedujo	—	—	22	22
Kopenhago	Danlando	3	5	8	16
Manchester	Britujo	7	—	7	14
Hago	Nederlando	9	11	11	31
Parizo	Franco	2	—	5	7
Stuttgart	Germanujo	14	2	19	35
Salzburg	Aŭstrujo	2	3	4	9
Zürich	Svisujo	14	8	10	32
Parma	Italujo	18	2	24	44
Firenze	Italujo	10	—	5	15
11 lokoj	10 landoj	86	33	119	238

B. 2.

Adresoj de 207 eksterlandaj kursanoj estis proponataj al aŭ proprainiciate elektataj de 31 hagioj, laŭ jenaj kombinoj:

Loko	Numero de la kursanoj	Hago kombinis el kol. 2	% de kol. 2	Detaligo Hagaj kursanoj						
				f-inoj		s-inoj		s-roj		sumo
1	2	3	4	5		6		7		8
Seksos de la Eksterlandanoj:				♀	♂	♀	♂	♀	♂	♀
Helsinki	13	6	46 %	—	1	—	—	4	1	4
Karlstad	22	8	36 %	1	4	—	—	1	2	2
Kopenhago ...	16	8	50 %	4	—	2	—	1	1	7
Manchester ..	14	8	57 %	6	—	—	—	—	2	6
Parizo	7	2	29 %	1	1	—	—	—	—	1
Stuttgart	35	24	69 %	10	—	5	—	—	9	15
Salzburg	9	8	89 %	3	—	1	—	—	4	4
Zürich	32	28	88 %	11	—	6	—	1	10	18
Parma	44	27	61 %	6	1	5	—	4	11	15
Firenze	15	7	47 %	1	—	4	1	—	1	5
Sume:	207	126	61 %	43	7	23	1	11	41	77
				50		24		52		126

Komento pri la ĉi-supre menciitaj kombinaĵoj: — La meza nombro de la kontaktoj proponitaj al, resp. laŭ propra iniciato indikitaj de ĉiu hagio kursano estas 4 (126/31). La procentoj menciitaj en la 4a kolono estas influitaj de la dato de ricevo en Hago de la koncernaj listoj; ili do ne esprimas proporciajn preferojn. Ŝajnas ke estis kelka prefero por montara Eŭropo.

El la 126 unuaj adresoj rezultis ĉirkaŭ 70 kontaktoj, do 56 %. Tio signifas meznombro 2 korespondokontaktojn po kursano, por komencantoj do la normalan mezono, kiu dum la evoluo de la kurso povis esti altigata per plie ricevitaj korespondadoj. La sumigo sekvas ĉi-sube. La listo ne estas kompleta; kelkajn kontaktojn, ekzemple kun Firenze, la kursanoj ne menciis al ni.

**

Je la finiĝo de la kursosezono okazis festvespero, kiel nova instigo. Daŭriga kurso stariĝis kaj daŭris ĝis la somerkomenciĝo. En la aŭtuno 1953 la Hago Popoluniversitato komencis 2 esperanto-kursojn sub la sama eminenta gvido, nome de Mag. Pragan, docento pri Esperanto en la Universitato de Amsterdam. En tiuj du kursoj partoprenis 50 studentoj. Aldone estis enkondukata kantinstruo sub gvido de s-ino E. Kervers van Tholen.

* ♀ = virinoj : ♂ = viroj.

B. 3. Realigitaj korespondokontaktoj de la 31 hagioj kursanoj.

Loko	Hagaj korespondokontaktoj	Detaligo hagaj kursanoj					
		f-inoj		s-inoj		s-roj	
Seksos de la eksterlandanoj:		♀	♂	♀	♂	♀	♂
		Helsinki	4	—	—	—	—
Karlstad	2	—	1	—	—	—	1
Kopenhago ...	3	1	—	1	—	1	—
Manchester ..	3	3	—	—	—	—	—
Parizo	1	—	1	—	—	—	—
Stuttgart	12	5	—	4	—	—	3
Salzburg	5	2	—	1	—	—	2
Zürich	16	6	—	6	—	1	3
Parma	15	3	—	2	—	4	6
Firenze	—	—	—	—	—	—	—
Sume:	61	20	2	14	—	10	15
		22		14		25	

La spertoj el la unua klopodo de internacia kunordigo de Esperanto-kursoj instigas al la sekvantaj rimarkigoj:

1) Temas pri kombino de buŝa instruado (laŭ instrukcioj de gvida centro, sed laŭ metodo de la loka kursgvidanto) kaj korespondado inter la kursanoj je internacia skalo.

2) La ĉefa problemaro rilatas al la didaktiko kaj al la aktivigado de la internacia grupformado pere de korespondado en la kadro de la kursoj, kio instigas soci-psikologian okupon relative novan en la Esperanto-movado.

3) Rilate la korespondadon necesas:

- loki ĝin ĝustamaniere en la tuton de la internacia kursirado;
- efektivigi ĝin laŭ praktika, simpla maniero por eviti superŝarĝon al la gvidantoj kaj al la kursanoj kaj;
- eltrovi la ĝustan „teknikon“ de la interŝanĝo de adresoj, por kontaktigi nur tiujn kursanojn, kiuj, komprenante la gravecon de la eksperimento, serioze volas kunlabori al ĝia sukcesigo.

Corn. J. Keur.